



AVILESA

Januaro – 2006 – N-ro 35-a
ASTURIO

ENHAVO

- 2...Nia Regiono
- 3...Luis Menendez
(LUMEN)
- 4...Ne venku deprimo..
- 5...Skizo
- 6-7..Astura Poezio
- 8...Mozaiko
- 9...Mesaĝoj
- 10..Amuza alfabeto
- 11..Somertempo
- 12..Pri Internacia
lingvo Esperanto
- 13..Saĝa katino
- 14..La kvar sezonoj
- 15..Amuzaĵoj
- 16..Pensoj



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**



MIERES

NIA REGIONO *MIERES*

Mieres estas municipo de la surcentro de Asturio kiu etendiĝas laŭ la rivero Caudal (elp. Kaŭdal') kaj laŭ iuj ĉeflankaj valoj, el kiuj la plej disvolviĝinta estas tiu de la rivero Turón. Mieres evoluis ekde malgranda kamparana vilaĝo al pioniro de industriigado kaj laborista movado (ĝi estas unu el la plej elstaraj lokoj kaj en la proleta astura revolucio de 1934 kaj en la luktado kontraŭ la diktatureco de Franco, je la jaroj 60-70). Ĝi havas ĉirkaŭ 50.000 loĝantojn. La ĉirkauaĵoj estas tre belaj; oni elstaru la valon Cuna kaj Cenera, kie oni trovas la sanktejo de la martiroj Kosmeo kaj Damjano. Tre proksime estas la vilaĝo Gallegos, kun vizitenda Etnografia Muzeo. Por la amantoj de la industria arĥeologio ni proponas la vidadon de la minejo Barreo. La ĉefurbo, Mieres, estas tre konata de la asturianoj kiel bona montrejo de trinkejoj kaj manĝejoj dediĉataj al la tipa astura cidrato. Tiusence, estas fama la angulo konata kiel placo del Requexu (elp. Rekeŝu).

Aliaj belaj lokoj de ĉi tiu zono estas Figareo, Santuyano, Ablaña (Ablanja), Urbiés kaj Uxo (Uŝo).

Mieres estas unu el la asturaj urboj en kie oni plej ofte povas aŭdi la asturan lingvon.

La Redakcio

Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: Nicolás Muñiz

Prezidanto: Cezaro García

Sekretariino: M^a Luísa Menéndez

Direktado kaj Desegno

revuo Antaŭen: Císimo Rabanedo

Kasisto: Luis González

Bibliotekistino: M^a Isabel Murillo

Gekomitatanoj:

M^a José Álvarez Faedo

Valentín Pérez

Eva González

Celestino Majo

Tere Rodríguez

Daise Murillo

Nia adreso

Llaranes Poŝtkesto 51 (CP 33460)

AVILÉS Asturias

Tfn 98 554 11 27

esperanto@asturies.org

Depósito legal:

Nº AS 1398 (1991)

N.I.F. 33677378

Subvenciita de la Registaro
de la Avilesa Municipo

LUIS MENÉNDEZ "LUMEN"

La avilesa poeto "Lumen" naskiĝis en Avilés la 11-an de novembro de 1894.

Fininte la unugradan instruadon, dum kiu li riveliĝis kiel nevulgara studanto, li profitis ĉiujn liberajn momentojn por daŭrigi instruante sin.

En 1911 li publikas, en la "Ĵurnalo de Avilés", sian unuan literaturan verkon; ekde tiam la kunlaborado en revuoj kaj ĵurnaloj rezultas tre konstanta.

Li kunlaboras en asturaj kaj asturamerikaj eldonaĵoj; li atingas premion en la florldoj de Játiva (Valencio); li estas tenata kiel majstro per iuj gejunuloj de la urbeto kiuj, okaze, incas sian literaturan karieron.

Kiam oni fondas en Avilés la popolan cirkulantan bibliotekon li estas nomumita, preskaŭ unuvoĉe, bibliotekiston de la sama; en 1923 li estras la festan ĉiusemajnan gazeton "La Ŝipanino" kaj en 1924 la revuon "La Buterkuko".

En 1925 aperas en Madrido volumon kiu estas laŭ maniero de antologio de sia verko en verso; ĝi titoliĝas: "Rigardante al la Kulmo" kaj ĝi obtenas favoran akcepton. Liaj samvilaĝanoj regalias al li, en aŭgusto de tiu ĉi jaro, per omaĝa bankedo. En tiu ĉi somero li fondas kaj estras "Gráfica Avilés".

Viktimo de la enlanda milito li forpasas en Avilés, la 12-an de novembro de 1937. Li forpasas neeldoninte unu verkon: "La Horo de la Neebloj".



CELESTINO

NE VENKU

DEPRIMO

NIN!

La pasintan 18an de Decembro, kiel ĉiujare, ni, la asturaj esperantistoj, renkontiĝis en frateca manĝado. Ĉi tiun jaron, la kunveno estis en Avilés.

La tago estis belega, ĉar spite al la epoko, la suno brilis kaj ni povis lokigi, sen problemoj de pluvo, la flor-faskojn kiujn ni kutime metas je la memoro de la kreinto de Esperanto.

Ĉiam rezultis al mi agrabla tago, ĉar ni renkontiĝas kun gesamideanoj kiujn nur ni vidas okaze de ĉi tiu afero, ĉiujare.

Ĉar la pasado de tempo ne perdonas, ĉiu jaro mi bedaŭras la mankon de geparencoj kaj geamikoj kiuj jam forlasis nin kaj kiuj lasis multe da agrablaj memoroj al mi.

Ne venas ankoraŭ junuloj altirataj de Esperanto kiuj daŭrigus ties disvastigadon.

Sed mi ne perdas la esperon ke, kvankam junuloj ne alvenas al ni, multe da ili kontaktu kun la internacia lingvo, pere de la reto, tiu komunikilo kiu unuigas nin laŭlonge kaj larĝe de nia planedo...

Ĝuste pro tio : Fidu nin ĵkaj...Antaŭen! ... Longan vivon al Esperanto.

Ludoviko

SKIZO

Marŝi kiel ombro
tra la vivado. Surprizi
en la lipo nin vokanta
tiun amon de virin'

Songî. Surfronte kunporti
la kison de unu iluzio
kaj en la animo kanzonon
de la amo antaŭsentita

Ami kaj vivi. Gustumi
la dolĉan mielon de l'vivo,
surface de lip' la kanton
de unu ekbruligita espero


Malkovri kaŝitan sciencon
ekzistanta en ĉiuj aĵoj
kaj ornami la ekzistadon
per revo de aro da rozoj

Ĉiam porti en la rigardo
kaj sur la lipo rideton
kaj enprizonigi aŭroron
kiu milŝanĝe iriziĝas

Marŝi... Iri kvazaŭ ombro
tra la vivado, surprizi
sur la lipo nin vokanta
tiun amon de virin'

Verkis *Luis Menéndez* "Lumen"

Esperantigis: *María Luisa Menéndez*



ASTURA

POEZIO

Deziro

Kraĉi poemojn sur unu pledo:
tio estas tio kion mi volas fari
vivadi priskribante ĉion
sur la cinismaj paperoj de libro
ĝi estas la nura maniero kredi sin
ĉar inko volvas veraĵojn
per la mortintaj folioj de la mortintaj arboj
kiujn unu tagon vidis nin pasante je la
monteto
kiu nun estas residejo por riĉa ularo

-pli bone ol ni-

kun planko el ligno, bone mobiligita,
duobla vitro por la malvarmo ne estanta,
lifto, belega koridoro, garaĝo, tri
banĉambroj.

reinici

estas tagoj (estas)
kiujn mi tute pasigas
premante [ctrl-alt
-supr] du fojon,
reinicante min de oka a oka horo
ne trovante taŭgan formaton
aktiva procesado, arkivo,
ne eĉ [reset.
estas tagoj (estas ja)
kiam mi iras liten
ne sciante ĉu iu kulpas pri tio:

-ĉi tiu muta klavaro el kiu mi devas eskapi
-eble mi

-aŭ simple, bill gates

la sono de la pordoj kiam fermiĝas

la nuraĵo kiu restas estas la kajoj,
la tretita fervojo kaj la staciestroj.
la sono de la pordoj kiam fermiĝas.
la ĉiutageco de konitaj distoj,
la urĝaj valizoj
kaj tiu bruta strategio:
la kondamno de la malrapidaj kilometroj

ĉio cetera ĝiras, ŝanĝiĝas,
puŝas nin translime,
kondukas estontecon ĝis ekzilo.

matena

ni trempis biskvitojn matenmanĝe
kaj la ĵurnalaro diris nenion novan:
okulo pro okulo, dento pro dento
ni ekrestadis blindaj
morditaj de vortoj
kuris sur ni pingloj
ekoksidis sango

veraĵoj inundiĝis je sablo
la inko de la rotativoj finiĝadis
ĉifiĝis la langoj malgajaj
mordis al si la lipojn najbarinoj
la vestaro sekiĝadis je la ŝnuroj

feliĉe neniam estas la argumento
se en via hejmo daŭre loĝas malvarmo,
ĝirigu la aksojn, skuu la strukturon,
ne manĝu pli da oldaj kruasanoj,
balaŭ la glacieron al via brusto ĵetu la rubon
--

subtera

mi volas daŭre
krii ekde la putro
kaj pasigi la tagojn

en la internaĵoj de ĉi tiu patrujo
paca je la ofte
ĝis kiam eksplodos
la rokoj de la klifoj
aŭ nur ĝis kiam ploros
la tuta horizonto.

mi povas atendi
ĉar mi ne hastas
-hasto min ne sufokas
de la surfaco
 eĉ ne semaforoj
 nek la sukceslisto...-

oni vivas bone ĉi interne
kriante ekde la puto
kvankam apenaŭ alvenas aero
kaj tre malfacilas spiri

origino

la punkto nul-nul
de mia kartografio
estas oranĝa urbo
pendanta de monteto
kun stratoj kiel fendoj
kaj trotuaroj malvarmaj en aŭgusto
kaj ĝardenoj malveraj
kiuj estas arbareroj...

la origino estas deklivo
nerifuzebila

a

t

u

r

k

kiu estas roĝo ĉiam
krom kiam pluas
ĉar iam havas asfalton
kaj iam ĝi estas ŝvito
kiu rigardas al la montoj
kaj vidas nian vivadojn

denove memoro

ĉar al ĝi ni malfermas pordojn

DENOVE

alvenis memoro kaj eniris hejmen
kiel la nuntempaj poetoj
ĝenega kantado
ĝi boris nian haŭton/ ĝi eniris nian
stomakon
promenis je la vejnoj / tuŝis al ni la nervon
nestis sur la materialo el kiu formiĝas la
strukturo

ni plu tiam ne scipovis diri "popolo"
nek "hejmo" nek "homo" nek "flago"
ni apenaŭ konservis ekvilibron
dum la vento etendis polvon,

dume: pluveto, viŝis la restaĵon.

nun mi nun kapablas rememori
tiun tagon kiam venis memoro
kaj la flavgrizan muzikon de tio kio
okazas
kaj kiom enuas rigardi kaj ne vidi iun
vojon

Carlos Sauri

(juna moderna aŭtoro en astura lingvo)

Trovebla interrete ĉe

<http://www.telecable.es/personales/lletres/>

MOZAIKO

REĜO JE MINUTOJ

Ludoviko la tria de Portugalujo reĝis sian landon teknike dum 20 minutoj; tiu ĉi estas la tempo kiu daŭris sia agonio pro morta vundo, minutoj post kiam sia patro estis murdita de pafo.

MONA LUKSEGO

La argentan manĝilaron de Martha, edzino de Georgo Washington, oni uzis por stampi la unuajn usonajn monerojn.

KIO OKAZAS, ULO?

Mel Blan, la viro kiun pruntis sian voĉon al la kuniklo Bugs Bunny alergiis pri karotoj.

LASTA NOTO

Mozart mortis en la sama momento kiam la lasta sonoril-bato de noktomezo sonis.

HAR-TUROJ

La frizisto de Marie Antonietote, sinjoro Leonard, konstruis sur la frunto de la damoj verajn turojn el haroj ornamitaj de pejzaĝoj, fruktoj kaj palacetoj. La har-aranĝoj estis tiel altaj ke la damoj ne povis sidiĝi en siaj kaleŝoj. Ili devis genui kaj en la loĝioj el la teatroj ke oni devis altigi la plafonojn.

NAĜE KAJ KUN BIKINO

Gertrude Ederle estis la unua virino kiu transnaĝis la Manikon, en 1926. Ŝi ankaŭ estis la unua virino kiu uzis bikinon: por atingi liberon en siaj movoj, Gertrude tondis sia ban-kostumon en du partoj.

DAISE

MESAĜOJ

Je la tago 18an de la pasinta monato Decembro, kiam ni festis la Zamenhof-tagon, honore al la kreinto de la internacia lingvo, akompanis nin kiel ĉiujare la gesamideanoj apartenantaj al la grupo "Astura Esperanto Asocio", kiu funkcias en la najbara urbo Ŝiŝono (Gijón en hispana lingvo, Xixón en astura). Ni ĝuis komentante pri niaj movadaj agadoj en la avilesa Domo de la Kulturo. Poste ni promenis tra la parko Ferrera por oferi bukedon je la du nomplatoj kiuj signalas "promenejo de Esperanto" (nur hispanlingve!).

Ĉu vi jam konas la retpaĝaro de niaj kamaradoj de AEA? Jen ĝi:

uica.info/esperanto

Kiam ni komencis la eldonadon de nia revueto ni promesis al niaj gesamideanoj ke ĉiun semestron aperos nova numero. Ni kontentas pro la bona akcepto kiun nia eta laboro havas de niaj geamikoj kaj gekorespondantoj.

Ni ricevis de nia norvega amikino Ellen Dalen diversajn numerojn de la gazeto "Vilna Sonoro" kiu anoncas la 90an U.K. en Vilno, Litovio.

Ni gratulas pro la fakto ke la prezidanto de nia grupo Antaŭen, Cesáreo García, eklaboris la pasintan union en nova urbodoma servo nomata ELliCTA (akronimo asturlingve de Areo pri Lingvo kaj Astura Tradicia Kulturo). Ni esperu ke, ekde la urbodomo li baldaŭ povu labori ne nur pri la normaligado de la astura lingvo en nia urbo, sed ankaŭ por ia oficiala rekonado de Esperanto! Ek!

Ni ankaŭ gratulas pro la naskiĝo de ITV, la Internacia Televido de Esperanto, grava ilo kiu uzas la modernan imago-teknologion por la disvastigado de nia lingvo. Se vi ĝin ankoraŭ ne konas, jen la retadreso:

internacia.tv

Jam alvenis la numero 35^a de nia revueto kaj ni volas profiti ĉi tiun okazon por deziri al ĉiuj niaj geamikoj ke la paco regu sur la tero kaj feliĉan jaron 2006.

Rememoru ke vi povas

kontakti nin retroŝtante ĉi tien:

esperanto@asturies.org

INTERRETO



Niaj Geamikoj!

AMUZAJ ALFABETOJ

Kelkfoje oni diras, ke Esperanto ne taŭgas kiel tutmonde internacia lingvo, pro ĝiaj eŭropaj trajtoj: origino de plejmultaj radikoj kaj... alfabeto latina!

Jam iuj proponis skribi esperantajn tekstojn per la cirila alfabeto por propagandi en orientaj landoj (Rusio, Mongolio, ...). Jen la frazo *Esperanto antaŭen!* laŭ tiu metodo:

Есперанто антаўен!

Simile, oni povus uzi araban/persan alfabeton por transliteri la saman frazon. Jen la rezulto laŭ ia propono (ankoraŭ ne tre zorge planita):

سپرانتو انتاؤن!

Apartan mencion meritas la ideo skribi per Tengvaro (Tengwar). J.R.R. Tolkien (aŭtoro de *La majstro de la ringoj*) desegnis ĉi belan alfabeton, tian ke ĝi povas prezenti preskaŭ ian ajn fonemon. La sama supra frazo skribita per Tengvaro:

ŝpɣ̌m̌p̌í m̌p̌m̌

Iuj opinias Tengvaron plej taŭga alfabeto por internacia lingvo, ĉar ĝi estas kulture neŭtrala kaj facile lernebla (pro sia logikeco laŭ fonologia vidpunkto). Aliflanke, lerni novan alfabeton estas multe pli facila ol lerni sufiĉe multajn gravajn vortojn de nova lingvo, malkiel eble ŝajnas.

Pri tiu ĉi afero, vi trovos pliajn informojn en la paĝo interreta <http://uica.info/esperanto/transliterado>

karlos enrike (carleos@uica.info)

SOMERTEMPO

Hodiaŭ estas dimanĉo, somertempe. Mi ripozas ĉe l'marbordo de iu malaga strango. La suno ege brilas kaj varmas. Ĉirkaŭe de mi multege da homoj amasiĝas. Kelkaj infanoj krias, ridas, serĉas konkojn, konstruas "kastelojn aŭ fromaĝojn" per kaldronetoj, ŝoveliletoj kaj humida sablo; ies gepatroj sunbaniĝas, ĝis tia grado ke iuj el ili montras sian blankan korpokarnon ruĝiĝantan pro la suna efiko, iuj naĝas en la trankvilaj, mildaj, kaj preskaŭ senondaj akvoj de la mediteranea maro, aŭ promenas; aliaj legas ĵurnalojn, gazetojn aŭ librojn kaj, fine, estas aliaj kiuj interparolas, aŭskultas muzikon aŭ dormetas. En la fora disto, kelkaj velŝipoj iras tien kaj reen. Ĉio invitas ĝui g vivon. Ŝajnas kvazaŭ ĉi loko, kie mi ripozas, estus la mezo mem de la Paradizo.

Ĉi tie, nun, oni ne konscias pri la gravaj katastrofoj kiuj de tempo al tempo okazas ie ajn en la mondo pliruigante eĉ la plej malriĉajn homojn de la plej malriĉaj popoloj, nek oni aŭdas la bruon de la bomboj aŭ kanon-pafoj ĵetitaj en la sennombraj militoj, kiuj en ĉi sama momento okazas en diversaj landoj de nia planedo; ankaŭ oni ne aŭdas la plorojn de centoj, miloj, milionoj da infanoj kiuj suferas pro malsano aŭ malsato, pro malboneco aŭ ambicio de homoj por subteni aŭ pligrandigi siajn sociajn aŭ ekonomiajn interesojn.


Malfeliĉe, oni forgesas ĉiun malbonon, kion okazas for de ni. Pravas tiu hispana proverbo kiu tekstas: "la sata kato ne memoras pri la malsata". Kion do ni devus fari? Ĉu resti senfaraj antaŭ tiom da maljusteco? Ĉu plendi? ne sufiĉas. Ĉu agadi? Kiamaniere?

Sendube tiuj, kiuj povas eviti aŭ rimedi tiom maljustajn situaciojn ne deziras ion fari. Eble siaj malsanaj mensoj opinias ke ju pli ili estos gravaj, despli aliaj homoj estos mizeraj kaj, sekve, dependantaj de siaj kapricoj kaj disponoj.

Analizante la konduton de tiaj "gravuloj" ofte mi hontas esti homa estaĵo.

La homa vivo, malfeliĉe, ne ĉiam estas tiel agrabla, kiel tiu kiun oni ĝuas en la hodiaŭa tago ĉe l'marbordo de tiu bela malaga strando...

IDOLO



PRI INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

Esperanto estas la plej bona solvo de la internacia lingva ideo.

Alberto Einstein

La plej grava estas mia konvinko pri la absoluta neceso de Esperanto

L. L. Tolstoj

Esperanto estas grava inventaĵo kun grandegaj ebloj.

Rabindranath Thakur

Mi ne dubas ke admirinda facileco de esperanta gramatiko kaj riĉeco de vortfarado faros ĝian senmortan

K. E. Ciolkovskij

Esperanto estas majstra verko de logiko kaj simpleco.

El deklaro de 21 membroj de franca akademio de sciencoj

La subskribitaj konstatas, ke establigo de Esperanto por eldonado de sciencaj verkoj estas tre efika rimedo por internacia kunlaborado.

El proklamo de 85 japanaj sciencistoj

Pripensante rezultojn de internacia lingvo la dua lingvo por ĉiuj, oni ne povas kompari ĝian signifos kun io alia ol kun inventaĵo de libropreso kaj ĝia influo je kultura vivo de nacioj.

Theodor Kilián

La plej utila estis Esperanto sur mi vojaĝo ĉirkaŭ la mondo.

Olav B. adreson, lektoro de sveda universitato en lundo

Mi ŝatas Esperanton, estus bone, se unuiĝintaj nacioj realigus iniciaton instrui Esperanton kiel deviga lernobjekto en lernejoj tutmonde, kiel la dua lingvo ĉiuj.

H. Kilian laxness, Islanda verkisto, en 1955 jaro li gajnis nobelpremion.

Estus bone, se malgrandaj nacioj, ankaŭ ni, dediĉus ĝuste al Esperanto pli grandan atenton...

Janis Rainis, Latovia poeto

Esperanto estas kreita je la sanaj filologiaj principoj, tial ĝi povos daŭre progresadi kaj pliriĉigadi.

W.E. Collinson, Angla lingvosciencisto.

Olga Glendova (CHEQUIO)

SAGA KATINO

(de la gazeto VĚSPERTO)

Avinjo havis nigra-blankan katinon, iutage ĝi naskis tri ĉarmajn katidojn.

La katidoj bele kreskis, kreskadis kaj ili iĝis petolemaj bestetoj. Ili tre ŝatis ludi kaj post tio dolĉe dormeti sub la rozujo.

La katopatrino kontente rigardis siajn karajn idojn. Ĝi sciis ke por la kato ne sufiĉas nur ludo. Ĉiu kato devas ellerni ankaŭ la sciindaĵojn.

Ĝi serioze diris al ili post la longa dormo:

-Vi devis ellerni la katosciencon.

Kompreneble la katidoj protestis, ĉar kiu katido ŝatas lerni; tiam la katopatrino diris:

-Bone, se vi ne deziras vi ne devas lerni, sed ekde morgaŭ vi mem kaptos la muson, se vi volas manĝi.

La katidoj konsentis kaj al ili plaĉis la ideo. Jam frumatene ili ekiris por kapti muson. Pasis longaj horoj, sed ne sukcesis la ĉasado, ĉar la musoj superis ilin.

La tri katidoj tre malgajiĝis kaj honteme reiris al la katopatrino.

-Kara panjo nia, bonvolu instrui al ni la musokaptadon, ĉar ne sukcesis la ĉasado.


-Ja, vi diris, ke vi ne deziras lerni, vi povas ekzisti ankaŭ sen lernado.

-Ne koleru pri ni, patrineto petegis la katidoj.

La katopatrino kompatis ilin kaj ili kune ekiris por ellerni, kiel akiri muson.

En la estonteco la katidoj ne kontraŭis, se sia patrino deziris instrui al ili ion.

Ili ekkomprenis, ke la katopatrino ĉiam volas al ili bonon.



ONKLO ADALBERTO

Katya Vergara (BRASIL)

La kvar sezonoj

Vintre, la arbaroj ŝajnas senvivaj; arboj skeletiĝas. Dika tavolo da folioj ĉifbruas sub miaj piedoj. Senbrue neĝeroj falas flugante. Mi ĉeestas mirindaĵon. Neĝo vatas la pejzaĝon, obtuzas la bruojn. Ĉiu arbo figuras kiel kolono de vasta templo.

Sur la neĝo pusiĝas la spuroj de diversaj bestoj, delikataj por la birdetoj, pezaj kaj profundaj por la aproj, cervoj...

Tamen senviveco estas nur falsa aspekto; la vivo koncentriĝas en la burĝonoj, vojiras subtere.

Printempe la vivo eksplodas; ŝosoj naskiĝas dise; baldaŭ tapiŝo de floretoj kovras la teron en la senarbejoj... blankaj anemonoj, orflavaj pikarioj, violkoloraj kardaminoj komponas tiun buntan bukedon. frue en printempo, malfrue en vintro galantoj traboras la neĝon... La listo de printempaj floroj aspektas tro multaj kial mi rezumas.

La burĝonoj disvolviĝas fragilajn foliojn. Baldaŭ la foliaro kribrigas la sunradiojn; La subarbejo malheliĝas; niaj floretoj malaperas kvazaŭ teatra dekoracio.

En la frondaro, la birdoj nestas, nuptiĝas; estas eksplodo de kantoj, krioj, fajfoj, triloj. Malfrue en la nokto najtingaloj konkuradas per belsonaj harmoniaj arpeĝoj.

Kukoloj kukuas; pigoj, kolomboj rukulas. La esprimoj diversiĝas kaj la specioj...

Sciuroj konstruas neston, alten en la branĉaro; petole. Niaj akrobatoj, lerte ili saltas branĉe branĉen

Atentu pri la rabobirdoj, pri la vulpoj kiuj gvatas, observas.

Baldaŭen junio kantoj rariĝas. Najtingaloj, kukoloj, orioj formigras.

Pri varmeĝo; la arbaro svenas en ian malviglecon, subarbe regas silento; eta vento trablovas la kamparon, horizonte ekaperas dikventraj nuboj (kumuluso). Atento plifortiĝas, ĝi iĝas uragano kiu frakasas, elradikigas kelkajn gigantojn de l'arbaro.

Fulmoj strias la ĉielon, tondroj eksplodas kaj terurigas ĉiujn bestojn. Hajlas, pluvegas, regas eke apokalipso.

Iom post iom, la ŝtormo kvietiĝas; birdoj modulas ariojn; la timo forfuĝis.

Somero finiĝas, la foliaro prezentas buntajn makulojn (flavaj, ruĝaj, oranĝkoloraj, brunaj) kiuj kuniĝas. Ĉiu arbo elvokas venecian lanternon kiu lumiĝas en la sunaj radioj.

Aŭtuno finiĝas, la folioj gracie falas flugante, kvazaŭ vunditaj birdoj. Nebuloj stagnas, stompas la formojn. Alte, en ĉielo, aro da grupoj, en angula formacio flugas suden krakante.

La melankolio enŝoviĝas en la aĵojn, en la mensojn, estas tempo dediĉita al la forpasintoj.

Ĉiujare la sama kalendaro malbobenas la saman filmon, malgraŭ tio mi ĉiam rigardas tian ferian spektaklon per infanaj mirindaj okuloj.

Guy Tatet

Francio



Amuzajoj

СІСІМО



Oldulo plendas al kuracisto:

- Sinjoro doktoro, ĉiutage mi urinas je la kvina matene.
- En via aĝo tio estas bone.
- Sed mi vekigâs je la sesa

Entombigante unu bopatrino renkontas du amikoj. Unu demandas:

- Do pro kio ŝi mortis?
- Iujn fifungetojn manĝetis..

Post unu semajno la samaj amikoj renkontas entombigante la bopatrino de la alia amiko. La bopatrino kuŝas malviva kun kontuzaĵo antaŭokule. Amiko demandas:

- Pro kio via bopatrino mortis?
- Aj, iujn fifungetojn manĝetis.
- Kaj kial ĉe ŝi antaŭokule estas kontuzaĵo?
- Fifungetojn ne volis manĝi..

- Kial vi ploregas, Maria?
- Mia edzo min jam plu ne amas! Ĝis hieraŭ mi vekis lin per kiso. Kaj hodiaŭ - li aĉetis horloĝon...

La edziĝo

Patrino — Filo, serĉu virino kun la samaj interesiĝoj kaj fine edziĝu!

Filo — Mi ne bezonas edzinon, kiu drinkas kaj amindumas kun aliaj viroj.

La krokodilo.

Paciento: De monato mi havas la saman teruran sonĝon. Mi vidas mian bopatrino tenantan per ŝnuro krokodilon. Imagu la malgrandajn, malicajn okulojn, grandegajn dentojn, senkompatan rigardon...

Psikiatro: Jes mi scias, kiel aspektas krokodilo.

Paciento: Atendu, pri la krokodilo mi ankoraŭ ne rakontis...

Renkontiĝas du grip-virusoj:

- Vi eĉ ne imagas, kiel belegan blondulino sukcesis al mi enlitiŝi

Dum la esplorado de paciento kuracisto demandas:

- Ĉu vi drinkas?
- Kaj ĉu vi havas ion?



PETAĴO

Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CÍSIMO R. SIMÓN
C/ La Magdalena nº 26 – 1º D

PENSOJ

“Mi ne devas vivi mian vivon por mi mem, sed ĉiam kiel parto de la vivo kiu disvolviĝas ĉirkaŭ mi.

Ĉiujn bonecajn semojn kiujn homo disigas tra la mondo, iam germos en la koro kaj en la penso de la aliaj homoj.

Neniam timu mokadon de la homoj, sed ĉiam sekvu la plej noblajn pensojn de via koro .

La mondo fordonita al l'egoismo de la interesoj similas al valo mergita en ombron.

En Lambaréné la vivo ne estas romantika kiel la plejmultaj tion opinias; por sukcesi necesas esti: mekanisto, ĉarpentisto, kamparano, ŝipisto, komercisto same kiel kuracisto aŭ ĥirurgo.

El nia interna vivo ni povas disdonigi nur erojn, eĉ al niaj plej intimaj geamikoj.

Jes, ni estas mistero unuj por la aliaj , ni bezonas submetiĝi je tio... mi opinias, ke neniu estas devigata fordoni sian internan vivon pli ol li / ŝi prijuĝas necesa:

Ni atentu, ke ni ne enmiksiĝi en la aliuloj sen ties peto.

Neniu el ni taŭge zorgas pri la pacproblemo, se li / ŝi ne daŭre estas agresata per la demando:

“Kion vi faras, por la paco“ ??

DOKTORO SCHWEITZER

Odette Scheidel (FRANCIO)